
Kurango Luko
numero 15



3-a trimestro 2009

Inaŭguro de la pumpbatilo kaj de la karuselo dediĉita al la internacia lingvo Esperanto

En tiu numero vi legos..

Malfrueco. *Jacques petas pardonon por la malfrua apero de tiu numero. Li esperas aperigi la numeron 16 antaŭ la fino de tiu jaro se li rapide ricevas sufiĉe da novaj artikoloj.*	
J. Pinon raportas pri la inaŭguro de nova Zeo* en Montrésor. *Zeo =zamenhofa esperanto-objekto.	p.1 p.2
Se vi deziras skribi Esperante per via komputilo, vi povas uzi la tekstilon, kiun J.Gaumé prezentas al vi .	p.2 p.3
M-F kaj J. Gaumé ricevis de sia itala amiko Giuseppe Lalli kortuŝan tekston pri la forpaso de sia hundo.	p.4
Sen aŭ kun ĉapelo, daŭrigo de la listo.	p.5
Dominik verkis sentitolan poemon.	p.6
M-Cl. Ledoux vizitis la biendomon de Ferdinand.	p.6
Tribo de indianoj parolas France en Usono. Pac Ema klarigas tion.	p.6 p.7
A. Aude partoprenis en la U.K. de Varsovio en 1959. Li rakontas okazintaĵojn.	p.7 p.8
Vi trovos solvon de la stranga mesaĝo proponita de J. Turbillon.	p.8
M. Foucher donas la recepton de kaĉo farita de tubercelerio kaj pomoj.	p.8

La 27-an de Junio 2009, dudeko da Esperantistoj venis el Le Mans, Angers, Lunay, Châteauroux kaj Tours sur la ombraj balkonoj de la rivero Indrois je la 11-a. Ni havis belegan someran veteron.

Guy Guétault klarigis, kun detaloj la funkciadon de la pumpbatilo en la ĉeesto de s-ro Moreau, la urbestro de Montrésor, kiu permesis tiun instaladon.



Guy rakontis al ni la historion de la ellaborado de la karuselo ekde ties genezo ĝis la fina realigado : flosinta maneĝo, kiu konsistas el grandega verda stelo, el terglobo kaj el la ĉiam moviĝanta rondodanco de 5 infanoj el ĉiuj kontinentoj.

Jen kelkaj detaloj : dum sia infaneco, Guy Guétault vidis en Montrésor tiun pumpbatilon, kiu estis ekster uzo de 1958. Ĉar li jam riparis la pumpbatilon de Greziljono, li interesiĝis pri tiuĉi. La urbestraro de Montrésor subtenis lin.



Dum du jaroj, nia genia metiisto serĉadis, adaptis, modifiis por redoni al la pumbatilo la tutan energion bezonatan por funkciigi la tutan sistemon je la gloro de Esperanto : stelo, terglobo, infana rondodanco.



Tiu arta ellaboraĵo estas aparte interesa. Ĝi perfekte ilustras la ideon de Paul Fort en la poemo "Se

ĉiuj knaboj de la mondo volus teniĝi per la mano... oni povus fari rondodancon ĉirkaŭ la mondo."



Tiel la pumpbatilo, inventaĵo de la fratoj Montgolfier en 1796, trovis sian aplikon en la kastelo de Montrésor en 1876. Dank'al tiu batpumpilo la bienulo alportis fluan akvon al la kastelo kaj al siaj najbaraj bienoj malmultekoste, tio faris grandan plibonigon por la ĉiutaga vivo kaj por la agrikulturo. La ĉeson de tiu sistemo en 1958 kaŭzis la difekto de la kastela turo, kiu subportis la akvujon.

Do en 2009, la pumpbatilo retrovas vivon ŝajnante eternan, ĉar ĝi estas kunligita kun la



akvofluo de Indrois. La produktata energio estas senpaga, ĝi permesas la funkciadon de tiu pacifika, didaktika kaj poetika karuselo antaŭ la scivolemuloj, kiuj promenas sur la "balkonoj de Indrois".

Jane Pinon


komputila klavaro


1. eskapa klavo
2. funkciaj klavoj 1 ĝis 12
3. retropaŝa klavo
4. alineofina klavo
5. presu-ekranon klavo
6. rula klavo
7. paŭza klavo
8. enŝova klavo
9. hejma klavo
10. antaŭpaĝa klavo
11. foriga klavo
12. fina klavo
13. postpaĝa klavo
14. cifera baskula klavo





15. paŝega klavo
16. majuskliga klavo
17. majuskliga klavo baskula klavo
18. reg- aŭ stirklavo
19. alternklavo
20. interspaca klavego
21. aligravuraĵa klavo
22. (kiel 17)
23. direktosagetoj sago-klavoj
24. ciferklavareto (nombra klavaro)
25. eniga klavo

Kelkaj menuoj en la fenestro de « Esperantilo »









« Esperantilo » estas programo por redaktado de tekstoj kun specialaj esperantaj funkcioj, ortografia kaj gramatika korektiloj kaj maŝina tradukado. Ĝi estas senpage havebla pere de la ttt-ejo « http://esperanto-tra-la-mondo.net/komputiko.htm »

Rex : gardista anĝelo

Vi ne konis vian patron. tamen via patrino estis tiel lerta, amema, zorgema, ke vi ne suferis pro lia malĉeesto. La 29-an de Aprilo 1998 okazis via naskiĝo. Via patrino, vaganta senmastra hundino,



Rex kun sia patrino (29/04/1998)

konis min kvin aŭ ses monatoj, antaŭ ol vi vidis la lumon, najbare de la domo de mia fratino, kie kolektiĝis vagantaj hundoj malsataj, al kiuj preskaŭ ĉiutage mi donacis nutran manĝon. Post ĉirkaŭ tri monatoj de malĉeesto, kun granda surprizo mi vidis vian patrinon ĉe la kradaĵo de mia domo. Tri tagojn daŭris la sieĝo ; via patrino sukcesis kortuŝi min kaj gajni lokon en mia hejmo.

Bedaŭrinde baldaŭ ŝi montris mienon malsanan, precize rilate al siaj movoj de la kapo, konstante klinita flanken, kvazaŭ ĝi indikus konsekvencojn de batadoj ricevitaj eble dum la sezono de amoroj. Ankaŭ ŝia irmaniero ŝajnis stranga, ne regula, ne starema. Vi bezonis mian helpon por nutri vin adekvate al via tre juna aĝo; la patrina laktonutro ne sufiĉis, pro tio mi estis devigata uzi sukĉboteleton dum almenaŭ du monatoj, ĝis finfine vi akiris aŭtonomion.

Malgraŭ ripetitaj vizitoj de veterinaro, la malsano malboniĝis tiom, ke en malbenita tago de Novembro via patrino lasis sian malfeliĉan vivon per helpo de sia kuracisto. Kia morna memoraĵo ! Nur via ĝojiga ĉeesto de petolanta hundido sukcesis regi al ni la grandan doloron de ŝia perdo.

Dume la vivo pasis sufiĉe feliĉe kune kun aliaj hundoj : Tom kaj Jerry, sed nur ĝis du jaroj poste, ĉar inter Junio kaj Julio de 2000 ambaŭ viaj samspecaj kunvivantoj mortis. Tamen via juna vigleco, ankaŭ se devigata al soleco, triumfis sur la morto kaj donacis al mi multe da feliĉaj jaroj, riĉaj je viaj senlimaj sindonemo, lojaleco, vivĝojo, kies forto transdoniĝis al ĉiuj viaj proksimuloj.



Rex (29/04/2009)

Malfrumatene la 21-an de Oktobro 2009 mi malŝlosas la kradon kaj per aŭto, enveturas laŭ la aleo sed strange mi ne ekvidas la silueton de Rex antaŭiranta. Ĉu li estas ankoraŭ vivanta ? Bedaŭrinde antaŭ kelkaj monatoj senindulga malsano trafis lin en la maldekstra flanko de lia buŝo, el kie karna bruna ŝvelo pendis eksteren. Alproksimiĝinte al lia kuŝejĉambro mi vidas lin kuŝanta sur tapiŝo, rigardanta antaŭen fikse kaj malvigle. Li malsanas. Mi hastas por malŝarĝi la varojn el la aŭto kaj kunporti ĉion sur la unuan etaĝon. Mi aliigas mian veston kaj min preparas por viziti Rex. Li estas tie, antaŭ la deklivo de ŝtupoj kiujn li svelte iam surgrimpis min vidinte. Post daŭra penado, ŝtupon post ŝtupo, li sukcesas atingi sian kutiman gardkuŝejon en la enirejo de la unua etaĝo.

Vane mi instigis lian apetiton proponante dietajn biskvitojn, la kutiman biergiston, kiun neniam li rifuzis antaŭe, kelkajn pecojn da freŝa mocarelo, bovlon kun haketitaj legomoj kaj skombro. Nenion li manĝis. Mi antaŭvidis la plej malbonon. Posttagmeze mi eliris por aĉeti pikfosilon kaj plugpioĉon : ili estos necesaj por pretigi dignan entombigon.

Reveninte hejmen mi apogis mian manon sur lian inertan kapon. Li ne dormis. Estis tro malfrue. Mi ne sukcesis renkonti lastfoje lian dolĉan rigardon de profunda interkonsento.

Nemezurebla malpleneco estiĝas en mia konscienco, konfirmita per absoluta silento, kiu superŝvebas en la tuta domo. Mi perdis la plej inteligentan el la hundoj, kiujn sorto konigis al mi, mian gardistan anĝelon, mian vivan ombron, kiu postkuris ĉian mian movon, ne anstataŭeblan amikon, gravan parton de mia plej nobla esenco.

Giuseppe Lalli

Sen aŭ kun ĉapelo ? *

esperanto	français	**esperanto**	français
pago	paiement	paĝo	une page
pasi	passer	paŝi	marcher
pasteco	consistance pâteuse	pastecĉo	pâté
pastelo	pastille	paŝtelo	pastel
pasto	pâte	paŝt(ad)o	paissance (de paître)
peco	morceau	pecĉo	poix
pico	pizza	picĉo	vulve humaine
pistujo	mortier (pharmacie)	piŝtujo	cylindre pour le piston
placo	place	placĉo	agrément
plago	fléau, plaie	plaĝo	plage
pluso	surplus	pluŝo	peluche (textile)
posta	postérieur	poŝta	postal
postaĵo	arrière, derrière	poŝtaĵo	le courrier
pregi	emboutir (technique)	preĝi	prier
puca	attifé (habillé)	puĉa	qui a rapport au putch
punca	ponceau (couleur)	punĉa	du punch (boisson)
puso	pus	puŝo	coup, poussée
ranca	rance	ranĉa	du ranch
rangi	occuper un rang	ranĝi	trier les wagons
raso	race	raŝo	rash (éruption cutanée)
regi	gouverner	reĝi	régner
rejso	réis (monnaie portug.)	rejŝo	ratio
romanco	romance (litt.) (mus.)	romanĉo	romanche (langue)
ruso	russe	ruŝo	ruche (vêtement)
sago	flêche	saĝo	sagesse
sako	sac	ŝako	le jeu des échecs
sakri	sacrer, jurer	ŝakri	trafiquer
salo	sel	ŝalo	châle
salmo	saumon	ŝalmo	chalumeau, pipeau
salti	sauter	ŝalti	allumer (électr.)

*Eltiraĵo de la libreto de Jacques Gaumé "Sen aŭ kun ĉapelo", franca traduko de la libreto de Josef Murĵan "Por kio ĉapelo ?"

Sentitola poemo

De tri tagoj frostas, pluvaĉas senhalte
kaj sur la podio mi sidas fiksante
la okulojn, la atenton sur nenio,
dum la lernantoj laboras pri kemio.

Silente, obeeme ili klopodas
solvi, por ili, problemojn malfacilajn.
Ekzamenon ili timeme atendas,
kaj esperas havi notojn nebanalajn.

Mi rigardas fenestren al la vetero,
miaj pensoj ekflugas ĝis Jupitero.
Subite Zeŭso alparolas min mense :
« Vekiĝu, la lernantoj kondutas mise. »

Mi endormiĝis, ne pro troa laciĝo,
ĉar oni bone dormas je mia aĝo,
sed en la brakoj de Morfeo kuŝis mi
por, mi hontas, la tempon forbagateli.

Ke la prigardantoj, estas ja sciate,
akiradas monon nenion farante,
mi diras la jenon : prenu mian lokon ;
Se fremda la fako, fermu vian bekon.

Do, la kolegianoj la taskon finis.
Senbrue, ili antaŭ min ĝin redonis.
Kaj atendante la tranĉan sonorilon
Ili ekflustras al si en la orelon.

Dominik

Biendomo de Ferdinand

Inter Saint Malo kaj Mont Saint Michel apud Dol de Bretagne, en biendomo de Roz Landrieux, estus fantono, kiu nomiĝus Ferdinand .Tiu fantomo venus nokte, vekigi la ne afablajn dormantojn !!!

Mi tranoktis plurajn tagojn en la biendomo sed mi ne vidis lin.

Ĉu mi estas tre afabla aŭ eble la fantomo estas timema ???

Mi iros unu semajnon, en aprilo, tiam eble li venos, dolĉe tuŝi min por vekigi min, kaj diri al mi :

- Saluton, kiel vi fartas ? Kion vi pensas pri mia biendomo konstruita dum la 13a kaj la 16a jarcentoj ?

Ĉu mi povos respondi ? aŭ ĉu mi estos timigita, aŭ ĉu mi demandos al li, ĉu la novaj proprietuloj ne ŝanĝis liajn kutimojn ?

Ĉu Tyfenn estas afabla knabineto ? kaj mi diros al Ferdinand, ke li ne devas vekigi ŝin, por ne timigi ŝin.

Se vi irus en Bretonio, vi povus kuŝi kaj manĝi en biendomo : La Grande Mettrie, kaj vi diros al mi ĉu Ferdinand vizitis vin.

M.C. LEDOUX



Kial la tribo Houmas (Huma) en Usono estas francparolanta ?

La Huma-indianoj estis farmistoj, kies kvieta vivo permesis la disvolvadon de la muziko, danco, arto, sportoj kaj religio. Tiuj 'ruĝhaŭtuloj' uzis la ruĝan kankron kiel militan emblemon kaj aglan plumon kiel pacan emblemon.

La franca esploristo La Salle notis la ekzistadon de unu vilaĝo Huma en 1682 laŭlonge de la orienta bordo de la riverego Misisipio, fronte al la fonto de la Ruĝa Rivero. En 1706, konfliktoj inter francoj kaj angloj pelis tiujn indianojn al la sudo, pli proksimen al iliaj francaj amikoj. Ili starigis du vilaĝojn apud Donaldsonville. Kelkaj el ili restis en la regiono, dum la aliaj iris pli suden kaj fondis la vilaĝon 'Chufuhuma', kiu iĝis la hodiaŭa urbo Houmas. La alveno de la blankuloj en la regionon pelis

(sekvo paĝo7)

(sekvo de la paĝo 6)

la Huma-popolon ankoraŭ pli suden, en la marĉajn lokojn. La tribanoj daŭrigis la agrokulturadon, sed por supervivi en la marĉejoj, ili iĝis ĉasistoj kaj fiŝkaptistoj.

Nuntempe, multaj el ili daŭre okupas sin tiamaniere. Iliaj ĉefoj estis indiferente viroj aŭ virinoj. En 1859, Rosalie Courteaux aĉetis por sia popolo marĉejojn, sed grandan parton de tiu tero fraŭde reprenis la blankuloj. La Huma-popolo sciis nek legi nek skribi kaj parolis nur la francan lingvon. Oni trompis ĝin per laŭleĝaj agoj, kiujn ĝi ne komprenis. La malkovro de petrolo akcelis la perdon de tiu tero. La tribo havis alian problemon : la lerneja sistemo de la Louisiane. La ŝtato ne agnoskis la Huma-popolon kiel indianan tribon. Do, ĝiaj infanoj rajtis frekventi nek la blankulan lernejon, nek la nigrulan, nek la indianan lernejon, kaj ĝi ne posedis sian propran. Do, la indianoj ne ricevis publikan edukadon. Nur de 1963, ili rajtas fari tion. La buroo de la indianaj aferoj ĝis nun volas ignori sian prirespondecon en la neagnosko de la tribo. Proe, ĝi ne povas profiti la federalajn servojn, kiujn la tribo rajtus havi. La Huma-popolo esperas tiun agnoskon por pli digne vivi.

Pac Emma

▪•▪•▪•▪•▪•▪•▪•▪•▪•

Okazintaĵo en tempo ne facila

Aliĝantaj la U.K. de 1959 en Varsovio, ni planis uzi la fervojon de Vieno al Varsovio, kiu trairis la tiaman Ĉekoslovakion.

En Vieno UEA-delegito kunportis nin al la kastelo Schönbrunn, kaj ni vizitis tiun belegan urbon.

Sed la traveturo de Ĉekoslovakio mirigis nin. Tuj ĉe la landlimo, nia trajno troviĝis en kaĝo. Vi certe vidis la tunelan kaĝon per kiu la sovaĝbestoj iras de la menaĝerio al la cirko ; imagu la saman je la skalo de trajno. Dum du horoj nia trajno haltis tie, policistoj prenis niajn pasportojn kaj kun ili iris en apudan domon. En ĉiuj stacioj, kie la trajno haltis, ĉekaj gesamideanoj salutis nin, ĉar ili estis supozintaj, ke troviĝos alilandanoj survoje al Varsovio. Ni ne povis iri sur la peronon : soldatoj malpermesis al ni forlasi la vagonon. Al tiuj, kiuj pretekstis bezonon de akvo, ili mem plenigis la ujon. Ni haltis en pluraj stacioj, ĉiam estis la samo : ĉekaj gesamideanoj salutis nin dirante "ni ne havas permeson iri al Varsovio". Tio tre ĉagrenis nin, ĉar Ĉekoslovakio kaj Pollando tiam havis saman reĝimon.

Tiam troviĝis ankoraŭ en Varsovio ruinoj.



Inter ili la reĝa kastelo, nun fidele rekonstruita estis ŝtonamaso. Mi ne mencios multajn faktojn, kiuj mirigis nin, nur unu, kiu min tre ŝokis ; iam en la tramo, kiun ni uzis por iri al la studenta hejmo, kie ni loĝis, ĉekoslovaka Esperantistino fanfaronis, ke sia registaro pagis ŝiajn tutajn elspezojn : vojaĝon, kongresan aliĝon, loĝadon eĉ manĝojn. Post la halto antaŭ la studenta domo, apud ŝtonamaso, kiel kutime ni diskutis, interŝanĝis niajn spertojn, ni parolis pri la kongreso, pri diversaj aferoj kaj subite dum nia kon-

(sekvo paĝo 8)

Solvo de la stranga mesaĝo proponita de Juanita . Temas pri du zamenhofaj proverboj.



e ĉ por plej terura tago venas vespero



post vetero malbela lumas suno plej bela

(sekvo de la paĝo 7)

versacio, kiu tute ne rilatis je tio, ŝi kraĉis al mi :

- Mi ne volus loĝi en via lando, kun via faŝista reĝimo.

Ankaŭ mi ne ŝatis nian tiaman registaron, tamen post tio, kion mi vidis dum la trairo de ŝia lando, mi eksplodis je la timo de mia edzino kiu petis :

- André, vi silentu, okazos al ni malfacilaĵoj ! Sed silenti mi ne povis.

- Sinjorino, mi diris, ankaŭ mi ne ŝatas mian registaron, tamen vi ne tute pravas, mi estas simpla laboristo kaj forlasis mian landon tute libere. Mia registaro ne scias, ke mi troviĝas nun en komunista lando dum viaj samcivitanoj esperantistaj ne povis veni ĉi tien.

- Jes, sinjoro, ŝi respondis, sed nuntempe multe da niaj arbaroj brulas.

- Ankaŭ en Francio multaj arbaroj brulas, sed ni ne akuzas pro tio la komunistojn.

Dum la sekvantaj tagoj tiu sinjorino distanciĝis de mi kvazaŭ mi havus ĥoleron.

Polino, kun kiu ni amikiĝis, aranĝis nian revenon en moderna svisa trajno veninta en Pollandon por komerca prezento, de Varsovio al Vieno. Mia edzino kaj mi estis solaj en tuta vagono, ni ne ricevis viziton de kontrolisto nek de policisto. Ni sentis nin veraj kapitalistoj. En Vieno ni vizitis la Esperanto-muzeon gvidataj de la fondinto S-ro Steiner, kun kiu mi amikiĝis kelkajn jarojn antaŭe en Wörgl, okaze de solena inaŭguro de monumento al D-ro Zamenhof. La kongreslibro de Varsovio en la muzeo estas tiu donacita de mia edzino.

André Aude

Kaĉo el tubercelerio kaj pomo

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

Elekti kun zorgo fruktojn kaj legomojn.

Ingrediencoj :

✪ 1 celerio
✪ 2 pomoj "Golden"
✪ olivoleo
✪ salo, pipro

1. Senŝeligi pomojn kaj tranĉi ilin en trancaĵoj Brunigi en malmulte da olivoleo. Rezervi.
2. Senŝeligi celerion kaj tranĉi ĝin en pecoj. Vaporumi ĝin dum 10 minutoj.

Kaĉigi la celerion kaj la pomojn . Miksi la kaĉon kun malmulte da olivoleo.

Spici kun salo kaj pipro.

Bonan apetiton !

Madeleine

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr